

Heinrich Heine,  
Dum sun-subiro  
staris

*tradukita de Manfredo Ra-*  
*tislavo*

Dum sun-subiro staris  
Ĉe l' maro la fraŭlin'.  
Suspirojn longajn faris,  
Kortuŝis tio ŝin.

„Ĉu vi pri tio miras?  
Malnovas tio ĉi!  
Ĉi tie ĝi subiras,  
Deposte revenas ĝi.“

*Traduko de la Germana poe-*  
*mo "Das Fräulein stand am*  
*Meere" de HEINRICH HEI-*  
*NE (\*1797-12-13 - †1856-02-*  
*17) en Esperanton de MAN-*  
*FREDO RATISLAVO (Manfred*  
*Retzlaff, Stettiner Str. 16,*  
*D-59302 Oelde, Germanio,*  
*\*1938-11-04) en 1985-05.04.*

MR-184-1 / Arg-471-909  
(2008-05-12 17:22:43)

Heinrich Heine,  
Fraŭlino ĉe la maro  
staris

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Fraŭlino ĉe la maro staris  
kaj ĝemis kun sopiro,  
kortuŝon tiel grandan faris  
al ŝi la sunsubiro.

Fraŭlin', gajiĝu senbedaŭre,  
vin olda scen' katenas:  
la sun' foriras ĉi-antaŭe,  
postdorse ĝi revenas.

*Traduko de la Germana poemo*  
*"Das Fräulein stand am Meere"*  
*de HEINRICH HEINE (\*1797-12-*  
*13 - †1856-02-17) en Esperanton*  
*de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalma-*  
*no Kaloĉajo, \*1911 - †1976).*

Arg-471-1078 (2010-05-22  
11:49:29)

Heinrich Heine,  
Das Fräulein stand am  
Meere

Das Fräulein stand am Meere  
Und seufzte lang und bang,  
Es rührte sie so sehre  
Der Sonnenuntergang.

„Mein Fräulein sei'n Sie munter,  
Das ist ein altes Stück;  
Hier vorne geht sie unter  
Und kehrt von hinten zurück.“

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo*  
*estas HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 -*  
*†1856-02-17).*

Arg-471-908 (2008-05-12 17:19:44)